

**Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaŭdon la 9-an de novembro 2013 per Skype.**
(Protokolo aprobita la 5-an de decembro 2013.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Mario Machlik en Tromsø
Amelie Matt en Tromsø
Herman Ranæs en Trondheim

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 10-an de oktobro

Aprobita kun ŝanĝoj.

2. Ekonomio

La kasisto raportis pri la ekonomio: Skagen Vekst kr 40 788,- Skagen Høyrente kr 63 862,-
La kasisto starigis altinterezan konton ĉe la banko DNB-Nor, sed bezonas pli da tempo por ordigi diversajn formalizaĵojn pri ĝia uzado.

3. Esperantonia

Cato Haugen jam laboris kaj ordigis en Esperantonia kaj sendis pri tio detalan raporton kaj fotojn. Nun li havas planojn ordigi la kelon aĉetante grandajn plastajn skatolojn. Li ankaŭ trovis solvon instali sendratan reton en la oficejo. La estraro apogas lian laboron kaj aprobas la proponitajn aĉetojn laŭ la prezentita buĝeto.

(Budsjet for innkjøp:

Bokser med hjul og lokk. 1000 kr

Garderobeskap på loppemarket 200 kr eller på Fretex 500 kr.

Trålost modem forventet pris 400 kr)

La estraro rekomendas al la klubo de Oslo konservi la valorajn librojn.

4. Landa Kongreso 2015

La estraro ricevis detalan priskribon pri la eblecoj havi Landan Kongreson 2015 en Lesjøfors. Ni konsideris ĝiajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn kaj decidis serĉi ankaŭ aliajn lokojn, kiuj estus pli facile atingeblaj. Lesjøfors tamen tre taŭgas laŭ nia opinio por eventuala seminario kun svedaj esperantistoj.

5. Proceduroj je aliĝoj

Ni daŭrigis la laboron pri tiu ĉi temo. Jardar esploras ĉu la sekretario ricevas mesaĝon pri aliĝo pere de la elektronika formularo de nia hejmpaĝo. La sekretario interparolos kun Douglas Draper pri praktikaj farenadaĵoj je aliĝoj kaj sendos raporton pri tio al la estraro.

6. Eventualaĵoj

Ĉu ni aranĝu skajpan seminarion en 2014? Pri kiu temo kaj kun kiu gastpreleganto? Ni diskutos tion venontfoje.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30 - 21:00

La venonta interkonsiliĝo okazos la 5-an de decembro 2013

Raportis Mario Machlik.